

& Ne fariĝi, nur esti:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mire redo doodo;do dodo dore mi; mi mimi mire miimi;mi soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 /Fariĝi vi ne volas, ; vi volas esti nur.
; Sed kiel ajn vi rolas, ; de vi ne restos
spur'.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en
ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-
kunven'**.)

'2 Vi estas sen kuraĝo ; kaj vivas por la
pomp'. ; Pro mank' de certa saĝo ; vi
vivas nur de tromp'.

'3 Vi iras al kongresoj, ; por ke ni vidu
vin. ; Sed viaj interesoj ; nur vente
montras sin.

'4 Vi vivas por speguloj ; kaj vantas en
la lum', ; fieras inter nuloj ; kaj eĉ sen
palpebrum'.

'5 Vi montras vin kaj rolas, ; laŭ dir' nur
pro plezur'. ; Fariĝi vi ne volas, ; vi
volas esti nur.)